
Perkomputora Termino-Kolekto
(Pekoteko/Terminoteko)

Bernhard Pabst
D-53773 Hennef

Südweg 42
Germanujo

Cirkulero n-ro 6, stato «93-08-03»

Al la Esperanta gazetaro

**Al kontribuintoj kaj
interesitoj de la kampanjo
"Fariĝu lingvo-
observanto"**

Terminara laboro en 1992

Estimata sinjorino,
estimata sinjoro,

jam pasis preskaŭ dek
monatoj de post nia cirkulero
n-ro 1 de decembro 1991,
dum kiuj multo okazis.
Intertempe mi denove
translokiĝis. Ek de tuj ĉiuj
aliaj adresoj, je kiuj mi estis
atingebla dum la nuna jaro,
nome tiuj en Darmstadt,

Obertshausen, Frankfurt,
Wiesbaden kaj Bonn ne plu
validas. Tamen atingas min
ankaŭ sendaĵoj direktitaj al
tiuj malnovaj adresoj, ĉar mi
kompreneble ĉiam petis la
poŝton plusendi kores-
pondaĵojn. Esperante, ke mia
nuna adreso estos de ioma
daŭro, mi tamen petas vin
estonte nur skribi al Hennef.

A. Nia kampanjo "Fariĝu
lingvo-observanto"

Malgraŭ la nekutime var-
mega somero en Mezeŭropo
kelkaj samideanoj jam sendis
siajn kontribuojn kun amaso
da interesaj ne-PIV-aj ter-
minoj, trovitaj en diversaj
aktualaj Esperanto-period-

aĵoj. Precipan dankon ni ŝuldas al sinjoroj Gerd Bernhard kaj Claus J. Günkel pro detalaj listoj. Ĉiuj interesitoj estas kore invitataj simile daŭrigi la observadon de la Esperanta gazetaro kaj atentigi nin pri registrindaj novaj aŭ ne jam notitaj vortoj.

B. Novaĵoj el la Pekoteko/ Terminoteko-mondo

Plej grava okazaĵo por la terminara laboro en tiu jaro certe estis la apero de prototipo de la jam anoncita verko „Plena Perkomputora Termino-Kolekto 1985-1990“ (PP). La kunordiganto, sinjoro Eichholz, sukcesis prezenti provizoran fotokopiitan eldonon en la Universala Kongreso en Vieno. Ekzemplero de la tri-voluma (!) verko kuŝas antaŭ mi. Kvankam mankas ankoraŭ la Germanaj, Anglaj kaj Francaj indeksoj (la Esperanta estas preta), ĝi jam tiuforme ampleksas ĉ. 1400 paĝojn (!) en formato A5 kaj pro tio estas pli dika ol eĉ PIV aŭ la Esperanta Bildvortaro. Sinjoro Eichholz nuntempe streĉe la-

boras por pretigi korektitan eldonon, kiu estu laŭeble havebla antaŭ kristnasko. PP interalie enhavos tre detalan enketilon de preskaŭ 130 paĝoj pri multaj vortfaraj kaj gramatik(1)aj punktoj nuntempe diskutataj kaj prenitaj rekte el la lingvo-praktiko. La verko ne estos havebla pere de libroservoj, ĉar ĝi estas konstante reviziata, tiel ke mendintoj ĉiam ricevos aktualan version. Se vi interesiĝas pri tiu impona verko, al kiu kontribuis ankaŭ nia rondo, atentu la mendilon je la fino de tiu cirkulero.

En nia cirkulero n-ro 3 de printempo 1992, kiun ricevis kelkaj aktivuloj, ni serĉis volontulon, kiu daŭrigus la klavadon de tre interesa Internacia Elektroteknika Vortaro laŭ la sistemo de Pekoteko/ Terminoteko. Danke al la perado de sinjoro Edward Spitaels sinjorino Van de Brande el Flandrio grandanime ofertis transpreni tiun taskon kaj jam konsiderindan parton klavis, malgraŭ siaj profesiaj kaj familiaj devoj. Per tio vojo ni volas kore danki al sinjorino Van de

Brande pro ŝia preteco tiel kontribui al la kolekto de nia elektronika terminarego. Ni informos per estonta cirkulero aŭ per la Esperanta gazetararo, kiam la elektroteknika vortaro estos havebla.

Usona samideano sendis liston de tipaj Usonaj subnutraĵoj („junk food“), kiun ni kun lia permeso transformis laŭ la reguloj de Pekoteko/Terminoteko kaj dissendis en nia cirkulero n-ro 2 de marto 1992. La listo enhavas terminojn kiel *cheeseburger*, *coca-cola*, *cracker*, *ketchup*, kiu eble estas sufiĉe internaciaj, krome ankaŭ internacie eble ne tiom konataj „bonaĵoj“ kiel *cole slaw* aŭ *relish*, kune kun traduk-proponoj al Esperanto, Germana, Hispana kaj Franca. Jam kelkaj „lingvo-observantoj“ prikomentis la liston kaj sendis proponojn pri korektoj kaj aldonoj. Al ili, same kiel al la aŭtoro, kiu petis ne mencii sian nomon, ni dankas. La listo estas bonevena kompletigo al la kolekto de terminoj de la Meksikan-Usona kuir-arto, kiu

aperis en la bedaŭrinde ne plu aperanta „Arizona Suno“ de sinjoro Edmund Grobe kaj kiujn ni registris en la 91-a serio de "lingvo-observanto". Cirkuleron n-ro 2 interesatoj povas peti de nia supra adreso.

En cirkulero n-ro 4 ni registris spertojn, kiuj rilatas al la teknika flanko de Pekoteko/Terminoteko, nome pri la demando kiel printi niajn elektronikajn registraĵojn kun ĉiuj diakritaj literoj kaj specialaj simboloj nur per la kapabloj de *WordPerfect* sen la helpa programo *Lettrix*. Tiu cirkulero estas interesa precipe por komputorantoj kaj povas esti petata de nia supra adreso.

En cirkulero n-ro 5 de junio 1992 ni diskonigis kelkajn terminojn kaj proprajn nomojn el Sudafriko, aperontaj ankaŭ en PP, por instigi al korekto kaj aldonoj.

En aŭgusto ni vizitis sinjoron José Vinck-Collet, Rue de Moha, 5, B-5030 Gembloux, Belgujo. Tie ni povis konstati, ke la laboro de la Rondo de Esperantistaj

Flaŭristoj (REF) pri tre ambicia faka terminaro el ties studkampo bone progresas. REF decidis uzi la sistemon de Pekotekto/Terminoteko por sia laboro. Malgranda parto de la REF-terminaro aperos jam nun en la eldono de PP de 1992, la resto espereble en postaj eldonoj aŭ en aparta verko.

Aliaj specialistoj same decidis favore al la sistemo de Pekoteko/Terminoteko. Laŭ informo de sinjoro Edward Spitaels la Asocio por Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturo (NBN), kies motoro estas la internacie konata Esperantisto-biologo prof. Wim De Smet, jam en 1991 eldonis la unuajn 500 terminojn. NBN proponas novajn logikajn biologiajn terminojn bazantajn je Esperanto. La kolekto de la biologiaj nocioj de NBN entenas krom Esperantaj terminoj la novajn regulajn terminojn de NBN, la ĝisnunajn sciencajn nomojn kaj tradukojn en la Angla, Franca kaj Nederlanda, ĉio ĉi aranĝita laŭ la konata modelo de Pekoteko/Terminoteko.

En la nuna stato precipe mankas ankoraŭ ekvivalentoj en la Germana. NBN pro tio tre ŝatus trovi unu aŭ plurajn German-lingva(j)n kunlaboranto(j)n, kiu(j) eble havas konojn pri biologio, kvankam tio ne estas nepraĵo. Interesatoj bv. rekte kontakti sinjoron Edward Spitaels, Tijllaan 11, B-2900 Schoten, Belgujo, tel. 03/658 74 20.

Germanlingvan kunlaboranton kun konoj pri kemio serĉas sinjoro Doug Portmann, 1517 Raymond Dr., Apt. 101, Naperville, Illinois 60563, Usono, por sia laboro super Kemia kaj Scienca-Teknika Vortaro (KSTV). Sinjoro Portmann petas helpon pri la Germanigo de listo de kemiaj nocioj difinitaj en Esperanto kaj kun tradukoj en la Angla. La listo estas havebla de nia supra adreso aŭ (prefere) rekte de sinjoro Portmann.

La Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) intence elektis komputoran hardvon kaj softvon, kiuj estas tre similaj al la sistemo

de Pekoteko/Terminoteko, tiel ke la kolekto de IKEF estas facile adaptebla kaj aldonebla al la kolekto de Pekoteko/Terminoteko. Tio parte jam okazis en la serioj de 1991 kaj 1992, kiuj tamen ankoraŭ ne aperos libroforme en PP. IKEF aldonis Esperantajn tradukojn al terminaro de la Eŭropa Komunaĵo pri Economie, Finance, Monnaie. Kontakti oni povas sinjoron Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgujo.

Sinjoro Ian Jackson, 29 Graham Rd., Chiswick, London, Britujo, W4 5DR, afable sendis al ni ekzempleron de Anglajura Terminaro en versio de 91-12-09. Temas pri Esperanta-Angla Terminlisto sen difinoj, kiu ampleksas 80 paĝojn en formato A4. Ĝi estas produktita per IBM-komputoro kaj WordPerfect 4.2, tiel ke ekzistas neniu teknika problemo iam kunigi ĝin kun la kolekto de Pekoteko / Terminoteko, se tio estas dezirata. Ni ofertis respektivan

kunlaboron al sinjoro Jackson.

Nenion novan en 1992 ni aŭdis de la projekto pri kristana terminaro (kunordiganto Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-7730 VS-Villingen, Germanujo) kaj pri ŝaka terminaro (Oskar Stolberg, Auenstr. 14, D-0-7010 Leipzig, Germanujo) kiu ambaŭ parte jam troviĝas en la elektronika kolekto de Pekoteko / Terminoteko, tamen ne ankoraŭ en la libroforma eldono. Ni esperas, ke la kunordigantoj fartas bone, kaj ke tiu cirkulero instigas ilin mallonge sciigi nin pri la stato kaj eventualaj progresoj de tiuj projektoj.

C. Novaĵoj pri ceteraj projektoj de terminara laboro

Ekster la "familio" de Pekoteko/Terminoteko raportindas pri la progreso de la Manlibro pri Politiko (MpP), je kiu kunlaboras ankaŭ "lingvo-observantoj" (kunordiganto Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-8900 Augsburg, Germanujo). MpP be-

daŭrinde baziĝas sur sufiĉe izola sistemo, nome sur Atari-komputoroj kun softvo "Signum" kaj "memtrikita" adapto por la diakritaj literoj. La provo trovi elektronikan "ponton" inter tio kaj Pekoteko/Terminoteko ĝis nun bedaŭrinde ne sukcesis. IBM-komputoro ne povis legi la datenojn, kvankam ili estis kopiitaj sur diskedo formatigita ĝuste per tiu IBM-komputoro. Estus tre dezirinda, se estontaj terminaraj projektoj dekomence ankaŭ pensus pri "eliro" al aliaj sistemoj kaj precipe al la plej disvastigitaj IBM-mikrokomputoroj por faciligi kunlaboron kaj eviti duoblan skribo-laboron.

Pri multlingva Vortaro de Forsta Fako kun laŭdire ĉ. 1000 forstaj nocioj ni ricevis faldfolion. Laŭ la ĉemetita ekzempla nocio-komplekso en la informilo la aŭtoroj ŝajne elektis aranĝon similan al tiu de Pekoteko / Terminoteko, tamen kun difinoj krom en Esperanto en la Germana, Angla, Franca, Hispana kaj Rusa. Kvankam ni jam komence de aŭgusto

petis pliajn informojn ni ĝis hodiaŭ nenion novan aŭdis. Interesatoj turnu sin rekte al ÖBBB, "Mehrsprachiges Forstwörterbuch", Alfred-Möller-Str., D-1300 Eberswalde.

Laŭ informo de sinjorino Wera Blanke en Esperanto aktuell 6/92, p. 4-5 Terminologia Esperanto-Centro (TEC) de UEA reaktivis kun nova sidejo en Ĉeĥujo. Kiel konate UEA fondis tiun "centron" jam antaŭ multaj jaroj en Zagrebo en tiama Jugoslavujo kaj dekomence forte subvenciis ĝin finance kaj materie. Malgraŭ tiu favora situacio konkretaj rezultoj en formo de pretaj terminaroj ne estis videblaj. Anstataŭe TEC tiutempe koncentriĝis je eltrovo de taŭga hardvo kaj softvo (oni fine eltrovis, kiel jam antaŭe estis farinta Pekoteko / Terminoteko, ke oni uzu IBM-kongruajn personajn komputorojn). Plie TEC okupis sin je konstruo de faka biblioteko pri terminiko, je ellaboro de tre ampleksa kaj detala regularo pri la aprobo de iam skribotaj terminaroj

kaj je kontaktoj al internaciaj ne-Esperantistaj terminaraj instancoj. La milito en hodiaŭa Kroatujo fine haltigis tiujn aktivecojn. Pri la sorto de biblioteko kaj maŝinaro en Zagrebo ni nenion pli aŭdis. Nun feliĉe inĝ. Pospišil daŭrigas sian jam antaŭe en sia hejmo komentitan laboron sub la flago de TEC, tiel ke tiu trovis novan sidejon. Kvankam laŭ nia scio nek reaperis la iama TEC-informilo, nek estis responditaj korespondaĵoj senditaj al la antaŭa centro, inĝ. Prospišil ŝajne nun akcentas pli la praktikan termino-faradon. Li ofertas komercan programon, kiu solvu la problemon de specialaj simboloj kaj diakritaj literoj. Elprovinde ĝin ni tamen rezignis instali ĝin en la komputoro, ĉar ĝi necesigas ŝanĝon en maŝin-proksima softvo (nome en la mastruma programo por diskedoj, maprodo), kio povus kaŭzi problemojn kun aliaj aplikaj programoj. La cetere tre malklara dokumentado de la vendita softvo ne klarigas, kiel oni povas eviti la riskon,

ke la jam instalitaj aplikaj programoj ne plu funkcias. Malklare ankaŭ restas, kiun problemon la nun proponita programo solvas, kiu ne jam estas kontentige solvita per la programo-kombino uzata de Pekoteko / Terminoteko kaj kiu estas senprobleme havebla en almenaŭ ĉiu okcidenta lando, same kiel probable en multaj aliaj. Krome sinjoro Pospišil en julio 1992 fine vendas tri malgrandajn elektronikajn terminarojn, inter ili la Terminaron de Hidraŭlaj Meĥanismoj de 1982, kiu jam enestas de post 1985 en Pekoteko / Terminoteko kaj servis kiel prototipo de ties elektronika serio. La aliaj du estas pri "Landoj, valutoj kaj lingvoj" (vd. pri tio temo ankaŭ PP p. 480-514, kiu enhavas ĉiujn pri-disputitan landnomojn kaj valutojn ne jam registritajn en PIV) kaj pri "stomatologio". Laŭ anonco la TEC-terminaroj ankaŭ estas haveblaj libroforme. Tre dezirinde estus, se TEC ofertus siajn terminarojn ankaŭ en iu baza elektronika formo (ekz. en ASCII- aŭ *WordPerfect-*

formato), kiu ne necesigus antaŭan aĉeton de nur mal-facile kaj riske uzebla aplika programo, tiel ke ankaŭ la Pekoteko / Terminoteko-mondo povas facile konsulti ilin. Se fine TEC ankoraŭ aperigos pliajn terminarojn nenio malhelpas interŝanĝon kun Pekoteko / Terminoteko, kiu ja estus tre utila. Inter-atoj skribu rekte al Ing. Jan Pospišil, Zadusni 3092, of. n-ro 56, CS-272 01 Kladno, Ĉeĥujo.

Laŭ informo de sinjoro Séan Osborne en "letero de leganto" al Monato 1992/8 p. 6 sinjoro Michel Duc Goni-naz, Val Saint-Georges, Chemin de l'Échelle, F-31000 Aix-en-Provence, Francujo, kunordigas laborojn cele al reviziado de PIV kaj serĉas kunlaborantojn. Al nia peto de 92-08-03 alsendi pliajn informojn ni ĝis nun tamen ne ricevis respondon. Ni esperas, ke ni ankoraŭ povos raporti pri tiu projekto.

Per tio ni volas fini nian malgrandan panoramon de la Esperanta terminara laboro en 1992. Ni ĝojas, ke ni de-

nove povis raporti pri multaj interesaj kaj diversfakaj aktivecoj terminaraj. Montri-ĝis, ke Pekoteko / Terminoteko intertempe estas vaste akceptita kiel taŭga sistemo por terminara laboro kaj fakte fariĝis la numero 1 de elektronikaj vortaroj en Esperantujo kun nuntempe pli ol 15000 nocio-kompleksoj; ĉio ĉi kvankam (aŭ ĝuste ĉar ?) ĝi eĉ ne disponas pri iu organiza strukturo. Ni petas ankaŭ estonte sendi ĉiujn informojn pri la terminara kampo al nia supra adreso. Ni ĝojus, se tiu cirkulero helpus (re-)instigi vin kontribui en via fako al aktuala internacia terminaro de Esperanto. Pri ĉiu helpo ni jam nun kore dankas al vi.

Dezirante al ĉiuj amikoj kaj samideanoj bonfarton, salutas vin ĝis espereble baldaŭa reskribo

Sincere

Bernhard Pabst

(Anonco)

Esperanto Press

Bailieboro, Ontario, Kanado,
KOL 1BO

Tel.: (..1-705) 939-6088

Mi mendas la 3 voluman
verkon

Plena Pekoteko 1985-1990

(ĉ. 1816 paĝojn plus du
demandiloj) je prezo de US\$
80.00 (aŭ DM 120.00) plus
sendkostoĵ de 15 US\$ (DM
20).

Ekvivalenton por la sumo
de US\$ 95.00 (DM 140) mi
pagos al la poŝtĝirkonto de
R. Eichholz, Bailieboro, On-
tario, Kanado: Hannover
Konto 1173 68-306

Mia nomo:

Mia adreso:

Ricevon de _____
kvitancas (R. Eichholz, dato)

La verko ne estos havebla
pere de libroservo, ĉar ĝi
estas konstante reviziata kaj
ni volas eviti, ke mendintoj
povas ricevi malaktualiĝ-
intajn versiojn. La elektro-
nika versio kun pli ol 3
megabajtoj da registraĵoj
kostos nur US\$ 20.00 kaj
estos ĉiam kopiita de la plej
aktuala versio. Bv. indiki ĉu
ni sendu la registraĵojn sur 5
1/4 colaj aŭ 3 1/2 colaj dis-
koj. Ni ankoraŭ ne kapablas
liveri registraĵojn sur diskojn
kun alta denso. Mendintoj de
PP povas je samtempa men-
do pli favorpreze akiri jenajn
librojn:

- Esperanto en la Moderna
Mondo (US\$ 10 anst. 25,
DM 15)

- Esperanta Bildvortaro
(US\$ 40 anstataŭ 48, DM 60)

ambaŭ sen sendkostoĵ, se
ĉio povas esti kune eks-
pedata.

*Enhave senŝanĝa represo de
la eldono Aŭgusto 1993. La
indikataj adresoj en multaj
kazoj ne plu aktualas.*

© Bernhard Pabst, 08.2006

Bernhard.Pabst[at]gmx.de